


V-19719/18

(1956)



18-a Jaro N-ro 187-188: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo. Jan-Feb. 1956

Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando



Telero, la nov-skola Orikomite aŭ Teks-Fajenco (Vidu paĝon 7-9)

Memornoto

Kiam la ĉielo kaj tero gajas printempe, nia koro ankaŭ printempas nature; kiam la ĉielo kaj tero vintras, nia koro ankaŭ vintras neeviteble. Ni vivas kaj vivas kun la ĉielo kaj tero. Same, ni povas diri, ke se la ĉielo kaj tero suferus, ni ankaŭ suferus neeviteble; se la ĉielo kaj tero gajus, ni ankaŭ gajus nature.

Inverse, se la homa socio nun suferas, ĉu ĝi povus esti io agrabla por la ĉielo kaj tero?

Unu jaro — ĝin oni povus dividi en la du periodojn je “varmeco kaj malvarmeco”, aŭ en la tri periodojn je “varmeco, mezvarmeco kaj malvarmeco”, aŭ en la kvar periodojn je “printempo, somero, aŭtuno kaj vintro”.

Ĉio en la universo havas sian propran ciklon (la leĝon de periodeco). Per la tuta klarigo al ĉiuj apartaj cikloj ekzistantaj en ĉio, la scienco estos satigita.

La homa korpo estas miniatur-tipo de la universo sin prezentanta en la minimuma formo.

La proporcio inter la homa korpo kaj la terglobo estas egala al tiu inter la terglobo kaj la granda universo.

Ĉiuj homaj eventoj — naskiĝo kaj morto, feliĉoj kaj akcidentoj ktp. okazas tute ne hazarde. Ili devas okazi koincide kun la naturfenomenoj — la kreskado kaj malkreskado de la luno, vento kaj pluvo, fulmo kaj tondro ktp. Kial? — ĉar la leĝo de periodeco en la unuaj okazas koincide kun tiu en la aliaj. Ambaŭ koincidas inter si kvazaŭ radaro konsistanta el ĉiuspecaj radoj, grandaj kaj malgrandaj — grandaj en la naturfenomenoj kaj malgrandaj en la homaj eventoj. La diferenco estas nur en la skalo.

La Administranta Dio en la Pratempe estis la Luno. Tiu ĉi pli kaj pli cedis sian postenon al la Suno. Kaj nun pli kaj pli vicas ree por la Luno. Tio estas esprimita per la vortoj “la Rekonstruado de la Mondo” en la Sankta Skribo de Oomoto.

Restarigo de la horoskopo kaj la alhemio estas la plej urĝaj okupoj por la moderna epoko.

“Ho, lertaj trompoj!” Per tiuj ĉi vortoj, plej simplaj sed fatalaj, la modernaj scienculoj emas fornei la fenomenojn de la “spirit-bilda rivelado”, “klarvido”, “tablo-movado”, same kiel la antaŭdirojn de la horoskopo kaj la alhemio. Entute, tamen, ili eraregas! Mi certigas, ke se oni iom pli modeste kaj serioze okupiĝos en la koncernaj studoj kaj esploroj, oni pli-malpli frue sed certe sukcesos al si konfirmi la ekziston de la Spirita Mondo transcenda je la kono de la moderna scienco!

Tiom da *formoj* malsamaj, kiom da *mondoj* apartaj. Ekzemple, kion ni vidas en la mondo de sonĝo, tio ne aperas en la sama formo kiel ni vidas ĝin en la mondo de vek-stato — eĉ se temas pri unu tute sama afero. El tio rezultas, ke la “spirita sonĝo” (revelacia) ĉiam prenas kvazaŭ enigman formon por ni.

Gotamo Budao uzis la frazon, “Trimil Grandaj Mondoĵ”, per kio estas konjekteble, kaj oni sciu, ke en la granda universo majeste ekzistas sennombraj *mondoj*. La homo en la nuna etapo traspertas nur unu mondon el la “trimil mondoĵ”! Kaj per mezuro de sia nura 50-jara vivsperto, kelkaj aŭdacas mezuri, kaj aliaj arogas fornei, la ekziston de la aliaj mondoj! Memoru, ke jam pasis kelkcent jarmiloj de kiam la homaro estiĝis, sed tamen ĝi ankoraŭ *ne konas sin!* kaj kial ĝi povus ekkoni aliajn mondojn?

Kio kondukis homojn al multaj eltrovoj kaj inventoj estis pli ofte dank’ al la fadeno de hazarda motivo — t.e. Dia inspiro (revelacio) — ol dank’ al la ĉnuro streĉita celtrafe jam de la komenco. El tiu ĉi fakto ni povas scii, ke la homo ne povas elfari ian merito-plenan grandan laboron sen la gvido de Dia inspiro — malgraŭ ke la modernulo ignoras ĝin, vane rezonante kaj strebante nur en la kadro de la malvasta scienco, sur kiu sole li sin apogas.

Antikvaj legendoj, ofte ŝajnas tro naivaj al la modernuloj. Sed la menso de la antikvuloj, kiuj faris ilin, estis kredeble pli pura, ol tiu de la modernuloj kaj sekve, tiom pli facile lasis sin influi de Dia inspiro.

Tial, kio formas la fundamentan kernon de ĉiuj antikvaj legendoj estas pli malpli simila en ĉiuj rasoj tra la mondo. Ankaŭ el tio ni povas konkludi, ke la antikvuloj verkis ilin sub Dia inspiro ĝenerale.

El tia vidpunkto, la legendoj de antikvaj popoloj plene meritas nian seriozan pristudon per komparado kaj elsarkado de partoj superstiĉaj aŭ partoj superfluaĵ, poste alpensitaj aŭ altruditaj. Ni tute ne konsentas kun tiuj, kiuj taksas la legendojn “infanecaj fabelaĵoj” dirante ke ĉi tiuj estas — unuvorte, “nesciencaj”!

Kio estas nescienca hodiaŭ, tio povus esti scienca morgaŭ. Kiu povas nei?

Dio de la Vivantoj

Petro Danov

Lastatempe ni sukcesis rekontaktiĝi kun *La Universala Blanka Fratara* en Bulgarujo. Kvankam la gvidinto Majstro Petro Danov fizike forlasis la mondon la 27-an de dec., 1944, la agado por la paco ankoraŭ estas daŭrigata de ĝiaj anoj. La jena estas el la prelego de Majstro Petro Danov, en traduko de s-ro A. Nikolov.

Red.

“Dio estas Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj”. MATEO 22:32

Vivantoj kaj mortintoj—tio estas du apartaj ideoj, du apartaj vidpunktoj. La vivon ni konas, sed la morton ni ne konas. Se iu opinias, ke li konas la morton, li sin trompas. Ĉiuj parolas, ke ili mortos, sed kio estas la morto—neniu scias. Interese estas, ke la nuntempaj sciencistoj ne kredas en Dio, tamen kredas en la morto. Ili diras: “Kial do ni ne mortas?—ja tiuj kiuj mortas fermas siajn okulojn, ĉu ne?” Sed, ĉu la fermo de la okuloj estas morto? La pulsado ĉesas, sed ĉu la ĉeso de la pulsado estas la morto? Homo povas fermi siajn okulojn, li povas ĉesi paroli, la koro povas ĉesi pulsadi, kaj malgraŭ ĉio *li* vivas. Estas kelkaj estaĵoj en la naturo, kiuj ne havas koron, kaj malgraŭ tio ili vivas.

Ĉiuj diras, ke ni mortos. Kia senco do estas prediki religion, Dion ktp? La nuntempuloj pli multe kredas en la morto, ol en la vivo. La negativaj ideoj en la mondo estas pli potencaj ol la pozitivaj. Do pro kio al ni estas religio, pro kio al ni estas ĉiuj sciencaj teorioj, se iun tagon la morto pereigos al ni ĉion?

La morto, kiel la homoj ĝin komprenas, estas nura elpensado de la homa intelekto. En malnova libro estas skribite: “En la tago en kiu vi malobeos la leĝon de la amo, de la prudento kaj de la vero, vi mortos”. Jen estas difino pri la morto. Se vi perdos vian liberecon, vian scion kaj vian vivon, vi estas mortinta. Se vi perdos vian vivon, vi perdos la movon, kaj en vi restos nenio alia ol la nuda konscio:—vi nur konscios, ke vi kvazaŭ havas manojn kaj piedojn, sed vi ne povas ilin movi; vi nur konscios, ke vi kvazaŭ havas koron, sed ĝi ne povas pulsati; vi nur konscios, ke vi kvazaŭ havas nervojn, vejnojn, sed via sango ne cirkulas.

Do, se la homo pekos kontraŭ la granda leĝo de la amo, li perdos la vivon. Se li pekos kontraŭ la granda leĝo de la saĝo, li perdos la scion, kaj se li pekos kontraŭ la granda leĝo de la vero, li perdos la liberecon. Do, sub la vorto “morto” ni komprenas senigon je la tri grandaj originaj elementoj, kiuj puŝas la homon al disvolviĝo kaj perfektigiĝo: ili estas la vivo, scio kaj libereco. Sen la libereco oni ne povas trovi veron; sen la scio, oni ne povas havi saĝon; sen la vivo oni ne povas akiri amon.

Estas dirite: “Dio estas dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj”. Do oni absolute malkonfesas la morton. La opinioj de la nuntempuloj pri la morto, pri la “transa mondo” estas nur iliaj infanaj supozoj. La nuntempaj sciencistoj ekzamenas unu sciencan faktan naŭdek naŭ fojojn kaj nur poste diras sian opinion, sed pri la morto ili estas sen ia ajn ekzameno kaj asertas, ke la homo mortas. Ili miksas la homon kun la korpo!

“Dio estas dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj”. Sub la vorto “vivantaj homoj” ni komprenas tiujn, en kiuj vekigis la dia konscio. Estas homoj en la mondo, por kiuj Dio estas dio de la vivantoj. Jam ne estas necese ilin demandi: “Ĉu vi kredas?” Tia simila demando ekzistas nur por la mortintoj! Tiuj, por kiuj Dio estas dio de la vivantoj, portas specifajn signojn de misio. Ili reprezentas la verajn semojn en la mondo. La skribo ilin nomas “Filoj de Dio”.

“Mortintoj” estas tiuj homoj, kies koro estas glaciiginta, kies menso ne kapablas pensi, kies volo estas paralizita. Ili deziras ion fari, sed ĉiam prokrastas. Se ili estas religiuloj, ili diras: Kiam ni iros en la ĉielon! aŭ se ili kredas en la leĝo de la reenkarigiĝo, ili diras: En la venonta reenkarigiĝo! Se oni jam ne lernas sur la tero, ĉu en la ĉielo ili lernos? Tiu ĉi filozofio ne bezonas kritikon. Ĉu muŝo enirinte en homan universitaton iam fariĝos scienculo?

Unu el la plej grandaj trompoj en nia tempo estas la aserto, ke pri Dio ni ne povas havi la difinitan ideon. Pri Dio ni povas havi la jenan ideon—la lumo sen ombroj, la vivo sen interrompo, la amo sen ŝanĝoj kaj perfidoj, la scio sen eraroj, la libereco sen limigoj.

La nuntempaj homoj hontas konfesi, ke ili kredas en Dio. Tamen honti kredi en Dio estas krimo. Pri Dio la prudenta kaj viva homo ĉiam diras: “Mi konas Dion; pri li mi havas nur unu opinion. Mi Lin konas, ĉar mi vivas, kaj Dio estas vivo. Jen estas la plej forta aserto.

La homoj hodiaŭ serĉas ĉion nur eksteraĵe. Ili serĉas vivon, ili serĉas scion, ili serĉas liberecon, sed eksteraĵe. La cititaj elementoj kaj ties tuta esenco estas troveblaj nur interne de ilia vivo, kaj tiujn ili devas entute penetri. Nur tiam en la homo okazos profunda interna revekiĝo, kaj la demando, ĉu estas Dio aŭ ne, fariĝos por li superflua.

Li komprenos, ke ne en la eksteraĵo kuŝas la servo al Dio. Ĉar la homo povas rifuzi sian riĉaĵon, li povas sin retiri en la arbaron kaj ne plenumi la volon de Dio de la vivantoj. Al li ŝajnas superfluaĵ ĉiuj bagatelaj demandoj de la homoj kun malklara konscio: ekz. "Ĉu vi kredas en la sankta triunio, ĉu vi kredas en..." Miloj da kredoj! La kredo pri la "sankta triunio" estas tiom malfacila, ke post milionoj da jaroj la homo apenaŭ komencos ĝin pristudi.

La viva homo kredas en Dio de la amo, kiu vivas en ĉiuj animoj, kaj en kiu ĉiuj animoj vivas — en Dio de la amo, en kiu ĉiuj estas unu. Tiun unuecon deziras tiuj, kiuj revekiĝis, por ke ili vivu en la konscio de ĉiuj, kaj tiam forfalos ĉiuj artoj kaj forpasemaj limoj inter la homoj. En tiu unueco la homo ekvibras en sia origina esenco, kiel viva animo.

"Dio estas dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj."

Perloj de la Majstro

VOJO DE LA MAJSTRO

Amu la perfektan vivon de la vero kaj de la vivo.

Metu la *bonon* kiel fundamento de via domo, la *justecon* kiel mezurilo, la *amon* kiel ornamo, la *saĝon* kiel protektilo kaj la *veron* kiel lumigilo.

Nur tiam vi min ekkonos kaj mi min elmontras al vi.

DIO

Tio, kio estas eterna aspiro de la homa animo, kaj kion ĝi serĉas en miloj da formoj, estas la amo — Dio. La plej granda afero en la vivo de la disĉiplo estas la celado supren — al tiu eterna bono.

LA MAJSTRO

La Majstro mem vokas siajn disĉiplojn.

Kaj la disĉiploj konas lian voĉon.

DISĈIPLO

Kiam la disĉiplo trovas sian majstron, li estas proksime al Dio.

AMO AL DIO

La disĉipleco komenciĝas per la amo. "Se vi min amas, vi obeos mian parolon."

Amu unue tiun, kiu ĉiam estas fidela kaj neŝanĝebla en sia amo al vi.

Amu tiun, kiu denis vivon al vi kaj ĉiujn kondiĉojn.

TRI PRINCIPOJ

La vero esceptas ĉiun ajn plezuron.

La saĝo esceptas ĉiun ajn facilecon.

La amo esceptas ĉiun ajn perforton.

LUMO

La disĉiplo vivas en la lumo.

Ĝi estas unika reala mondo. La ombro ne estas reala.

Serĉu la lumon, kiu ne havas ombron.

Evitu ĉiun ajn penson kaj senton, kiuj enportas mallumon en vian konscion.

VERO

"Kapo de via parolo estas la vero."

Kie la vero brilas, ĉio floras kaj la frukto maturiĝas.

La disĉiplo komprenas la veron tiam, kiam li ĝin aplikas.

PURECO

La disĉiplo devas esti pura en siaj pensoj, deziroj kaj agoj, por ke la Majstro povu konfidi al li la metodojn de la laboro.

LA VOJO DE LA DISĈIPLO

La vojo de la disĉiplo estas vojo de Mateniĝo. Ĝi estas vojo de eterna lumo — portanto de la amo.



Pri Teks-Fajenco —

Nov-Skola Ceramiko

Kredeble ĉiuj ceramikistoj de la mondo havas grandan intereson en la orientaj ceramikoj, kiuj havas la longdaŭran tradicion. La celo de ĉi tiu artikolo estas prezenti al ili kaj al nia legantaro la novaĵon — la *Orikomite*, aŭ teks-fajenco, la tute nova skolo de ceramiko, fondita ĉe Kamejama Ceramikejo. La debuto de la teks-fajenco kaŭzis sensacion inter japanaj belart-amantoj kaj ankaŭ ĉe parto de amerikanoj kaj eŭropanoj kiuj nun estas en Japanujo.

Kio estas la teks-fajenco?

Antaŭ ĉio ni klarigos pri Kamejama-Ceramikejo, kie la teks-fajenco originis. La ceramikejo kuŝas en la teritorio de Oomoto-Centro, Kameoka. Kvankam Kameoka, jam antaŭ ĉ. 200 jaroj, havis ceramikejan fornon, konstruitan de la tiama feŭdestro, tamen la nuna Kamejama Ceramikejo havas nenian rilaton kun ĝi. En 1925 Majstro Onisabro Deguĉi fondis sian fornon nomitan "Zuigecu-gama", kie li produktis man-faritajn tetasojn. La legantoj, kiuj legis la aprilan n-ron de OOMOTO, 1951, kredeble bone memoras, ke li en malpli ol du jaroj antaŭ sia forpaso en 1948 el-

faris ĉirkaŭ 3,000 tasojn. Kaj pri la valoro de tiuj tre alte taksis la ceramika artkritikisto, s-ro Giĉiro Kato. La nomo de O. Deguĉi famiĝis en la japana ceramika rondo.

Post la forpaso de O. Deguĉi, s-ino Naohi Deguĉi, filino de la Majstro kaj la nuna Gvidantino de Oomoto, daŭrigas la laboron de sia patro por plene "unuigi Arton kaj Religion". Antaŭ kelkaj jaroj ŝi starigis novan ceramikejon kun la



Akvokruĉo uzata por la te-ceremonio, la Neriagete-skola fajenco (20 cm. alta). Oni uzas ĉerpiletan, ĉar la kruĉo estas sen verŝilo.

forno transportita de la malnova kaj historie fama ceramikejo "Hakusan-gama", Kioto, kiun dediĉis al ĉi s-ro Sango Uno, ceramikisto (kaj aŭtoro de la seria artikolo de "Japana Kulturo" en OOMOTO). Oni nomis ĝin "Kamejama Ceramikejo". La ceramikejo estas samtempe la ekzercejo por ni celantaj al "Unuigo de Arto kaj Religio" sub la gvido de Naohi.

Kiel la oomotanaj legantoj memoras, la mortinta patrino de Naohi, Sumiko Deguĉi tre amis la mantekadon, kaj postlasis multajn elegantajn teksaĵojn. Ŝi ofte diris, "Mia manlaboro estas modesta, sed mia ĉeftasko, destinita de Dio, estas plenumi la 'modelon' laŭ kiu nur poste 'Monda Brokato' teksigis". Ŝia laboro estis spirite altvalora kaj ŝia klopodo ne vana, ĉar ĝi nun reviviĝis en alispeca formo de artesprimo, t. e. *teksado per argilo*. Jen la "orikomite" aŭ teksfajenco.

La arto de ceramiko originas jam de la antikva tempo, sed ĝi restas ĉiam ankoraŭ nun en la tradicia rutinaĵo de la eksteraj elementoj: formo, glazuro, desegno aŭ pentro ktp. Neniu atentis ĝis nun la natruran belecon de argilo mem, kiu estas la substanca materialo por ĉia argilaĵo. La beleco de argilo ja estas la esenco de ĉiuj argilaĵoj, kaj en ĝia arto kaj alta utiligo sin manifestas la karakteriza belo. Kiel artisto, Majstro O. Deguĉi iam instruis: "En la origina forto por la Universa Kreado estas la

origino de Arto". Analoge, ni povus esprimi, ke la belarta origino de argila o devas esti en argilo mem. La Majstro ankaŭ instruis: "Ĉiu kreita o de Dio havas en si la propran econ, kiu mem estas ĝia ekzist-valoro". La Orikomite aŭ teksfajenco ja celas plene vivigi la propran valoron de argilo en la kreado de ceramikaĵoj.

Por plene utiligi la naturan puran belecon, kiun havas argilo mem, oni provizore ignoris la ĝisnunan ĝeneralan teknikon pri glazurado, desegnado ktp., kaj antaŭ ĉio oni preparis pli ol du malsam-speciajn krud-argilojn knedante en apartaj ujoj, due distranĉis ilin en certajn grandojn kaj fine interplektis ilin same kiel oni teksas. Unuvorte, la procedo estas ceramikarto kaj teksarto en unu formo. Tiamaniere la karakteriza abstrakta belo de diversaj desegnaĵoj kreiĝas laŭ la libera aranĝo de la naturaj koloroj kaj gustoj, kiujn la uzitaj argiloj en si havas. La legantoj bone povos apreci la belecon, tiamaniere kreitan, pere de la prezentitaj kelkaj kliŝoj.

Pri la motivo por tiu ĉi elprovaĵo s-ino Naohi Deguĉi rakontas jene:

"Dank' al nia ceramik-studado pri la argilaĵoj, produktitaj en niaj najbaraj provincoj, ni hazarde trovis en ili tre originalajn ĉarmojn de respektivaj termaterialoj. Tio tiris nian atenton kaj intereson tiel ke ni deziris iamaniere enkorpiĝi la naturajn originalecojn en niajn verkaĵojn. Ni antaŭ ĉio elfaris unu specon de *Neriagete**. Intertempe

iu el niaj kunlaborantoj proponis ke ni prove teksu argilojn sekvante la ekzemplon de mia patrino, kiu amis mantekadon dum sia vivo.

"Post la unua eksperimento ni ĉiuj miris trovinte en la novbakitaj argilaĵoj la naturan belecon de la argiloj revivigita en mirinda, freŝa, korvarmiga familiareco.

"Ni nun estas feliĉaj ke niaj novaj modestaj eksperimentaĵoj altiris la atenton de la publiko."


En oktobro, 1955, la Orikomite debutis antaŭ la publiko kiam okazis la ekspozicio en Tokio. La publika opinio estis favora al ĝi. Sekve la ekspozicio sinsekve okazis en Osaka (en nov.) kaj Okajama (en jan., 1956). Ĝi plue okazos ankaŭ en Kanazaŭa, Fukuoka kaj Kumamoto. La nekutimaj belaj aspektoj de la ceramikaĵoj ege frapis la okulojn de vizitintoj. Interalie ceramikamantoj kaj artkriticistoj alte taksas ilin kaj kuraĝigas, dirante ke la ideo estas unika kaj la estonta evoluo estas tre promesriĉa.

Kiel jam dirite la teksfajencoj estas farataj per malsamaj argiloj el diversaj lokoj tra la lando. Sekve, la pliboniĝo de teksfajencoj dependas de la varia aranĝmaniero de teksotaj argilspecoj, kiuj havas respektive karakterizan koloron kaj guston. Se ni povus

kollekti diversajn materialojn vaste el la mondo pere de interesataj legantoj de tiu ĉi artikolo, niaj art-fakanoj povus elfari per ili aparte interesajn ceramikaĵojn. Ĉu la legantoj trovas en tio ian intereson kaj signifon? Ni atendas la kunlaboron de volontuloj.

La Red.

* Argilaĵoj produktitaj en Sung-dinastio en Ĉinujo. Ili estis kunmete elfaritaj el du malsamaj argiloj kun kaj sen metala ingredienco. Eble pro neperfekta tekniko ili havis mankon de argilsplitiĝo ĉe la bakado. Post portempa famiĝo en Ĉinujo kaj Japanujo la produktado baldaŭ ĉesis en ambaŭ landoj kaj neniu profesiulo escepte kelkajn japanojn ĝis nun atentis pri ili. La Orikomite tute supervenkis tiun mankon kaj kreos la tute novan artan mondon.



Kvadrata Telero, la nov-skola Orikomite aŭ Teks-fajenco (25 x 30 cm.)

Vero el Eraro

Per aerpoŝto atingis nian redakcion la februara numero de La Praktiko. "Kio okazis?" mi miris. Sed la miro ne bezonis longe daŭri antaŭ ol ŝanĝiĝi en agrablan surprizon, kiam okulfrapis la titolo de l' unuapaĝa artikolo: Sovetunio oficiale ekuzis Esperanton." Dum la legado de l' artikolo, denove nin kaptis miro aŭ dubo, ĉar la afero koncernas Japanujon, des pli, ke la "sensacia novaĵo" ne estas "el Moskvo", sed efektive "el Tokio". Ĉu ne estas strange? Kiamaniere povis okazi, ke tia granda novaĵo de Tokio ne atingis nin rekte kaj pli frue, anstataŭ per eldonaĵo el Nederlando? La demando restu demando. Ĉiuokaze la novaĵo estas certe sensacia kaj ĝojiga.

Por plicertigi la aferon kaj, se eble, por mankapti la tekston de la telegramo de Molotov ni tuj komencis esplori la rimedojn, duone kun espero kaj duone kun timo. Tre frue venis disreviĝo, ĉar post du tri tagoj ni ricevis La Revuo Orienta de Japana Esp-Instituto, en kiu troviĝis simpla anonceto, ke la Molotova telegramo ne estas en Esperanto kaj ke iu radiostacio erare disaŭdigis. Fu!ĵo! Mia scivolemo tamen estis iom obstina por facile estingiĝi per tiu anonceto. Ĝi kunvokis al si novan energion por persekuti kaj fapti la personojn

kaj ceterajn detalojn kiuj rilatas la eraron. Amikoj en Tokio kunlaboris kaj fine klariĝis la afero: —

La telegramo estis en lingvoj rusa kaj angla. S-ro Mazima, grava kunhelpanto de la Japana Popola Konsilantaro, la adresito de la telegramo, erare prenis la rusan tekston por Esperanta. (Tio montras ke li konas nek rusan nek Esperanton.) Al la demando de raportisto de la Kultura Radiostacio li respondis, ke unu teksto estas en angla kaj la alia eble en Esperanto. La menciita radiostacio disaŭdigis la "novaĵon". Aŭskultinte ĝin, iu raportisto telegrame raportis al la Londona "Sunday Times", kiu ĝin publikigis. Kaj d-ro Lapenna kredis ĝin kaj skribis artikolon por La Praktiko. Jen estas la rapidira kariero de la erara novaĵo.

Oni povas facile vidi, ke almenaŭ ses personoj eraris por ke la novaĵo aperu en La Praktiko. La unua kaj sendube la ĉefa erarinto estas kompreneble s-ro Mazima, la dua estas la raportisto de l' radiostacio — li kredis eraron, do eraris. La tria estis la raportinto al la "Sunday Times", la kvara estas ĝia redaktoro, la kvina estas nia estimata d-ro Lapenna kaj la sesa — la neniel malpli respektinda redaktoro de La Praktiko.

Dum en la eraro de la unua kaj

dua erarintoj ni vidas simplan eraron, se ne malgravan, en la eraro de l' lastaj tri aŭ kvar erarintoj, precipe de d-ro Lapenna kaj de s-ro Cseh, ni konstatas notindan signifon. La unuaj du erarintoj ne konis la gravecon de la afero, ĉar certe ilia senkono estis la kaŭzo de la eraro. La tria erarinto certe konis la gravecon kaj pro tio li sendis telegramon al Londono; pri la du lastaj jam ne estas necese diri.

Kial do tiuj personoj, kiuj posedas plenan konon pri la temata afero, tiel simple faris eraron per facila ekkredo? Ĉar la grundo estis jam tute preparita. Se estus antaŭ du tri jaroj, la eraro-ĉeno neniel daŭrus ĝis la kvina ĉenero. Molotov-telegramo — en Esperanto. "Tio povas okazi!" — kredis la "Sunday Times", kredis La Praktiko, kredis eĉ d-ro Lapenna, kiu estas certe la plej informita, la plej kompetenta persono pri la lasttempa situacio de nia lingvo en diversaj landoj tra la mondo.

Estas japana proverbo "vero el

eraro", kiu estas ĝenerale uzata kiam oni volas diri, ke erara famo ofte kreas veron. Sed en la Molotova telegramo ni ja vidas "veron el eraro", en iom alia senco ol ordinare. Ĉar en tiu eraro mem kuŝas multe da vereco, kiel skizis d-ro Lapenna en La Praktiko pri la nova tendenco en Sovetunio. Ni havas freŝan impreson pri la 20-a Kongreso de la sovetaj komunistoj, en kiu la nunaj gvidantoj oficiale kritikis la teorion kaj politikon de Stalin kaj tio donis egan sensacion al la mondo. Ĉio rapide ŝanĝiĝas. Kaj ni povas ankaŭ esperi, ke iam post ne longe okazos efektive la "vero el eraro", eĉ kun pli majesta formo ol persona telegramo adresita al popola organizaĵo, nome ekzemple, kun oficiala dokumento adresata al registaro.

Ni tre ĝojas, ke jam venis tempo, kiam povas aperi tia eraro, kia estas temata, kaj dankas al ĉiuj koncernantoj, kiuj bonvole klopodis erari.

E. Ito

S-ino Worcester kun membroj de Esp-Societo de Ikuno-Altlernejo en Osaka. La foto montras s-inon W., dekstre s-anon Okumura, instruisto de la altlernejo kaj maldekstre s-anon Kojima, s-ano el Osaka. La artikolo pri ŝia vojaĝo aperis en la lasta numero.





Japana Parlamento Pasigis Rezolucion por Ĉesigo de A- kaj H-bomba Eksperimentado

La Japana Ĉambro de Representantoj ĉe la plena sesio la 9-an de feb., 1956 unuanime pasigis la rezolucion admonanta, ke la grandpotencoj de la mondo ĉesigu la eksperimentojn per nukleaj armiloj.

La rezolucio estas proponita komune de Liberal-Demokrata kaj Socialista Partioj, instigataj de la raporto ke Usono kaj Britujo okazigos tre baldaŭ grandskalan eksperimenton per nukleaj armiloj sekvante la lastatempan similan eksperimenton age de la Sovetunio.

La Ĉambro de Konsilantaro ankaŭ unuanime akceptis la similan rezolucion la sekvantan 10-an tagon. Jen la rezolucio de la Ĉambro de Representantoj:

“Ĉesigi la eksperimentojn por la milita uzo de nukleaj armiloj jam estas la forta komuna deziro de ĉiuj popoloj de la mondo. Malgraŭ tio, la Sovetunio ofte plenumis senavertajn eksperimentojn, Usono ĵus anoncis, ke ĝi planas baldaŭ eksperimenti per H-bomboj sur la atolo de Eniwetok, kaj oni raportas, ke

ankaŭ Britujo planas fari similajn eksperimentojn. Ni, japana popolo, la unua kaj la plej granda viktimo de l' bomboj, hayas nesubigeblan deziron, ke la teruraj eksperimentoj por milita uzo de A- kaj H-bomboj estu ĉesigitaj dank' al elfaro de internacia kontrakto.

La Japana Registaro devas senprokraste preni sur sin la taskon transdiri la supran deziron de la japana popolo al la registaroj de Usono, la Sovetunio kaj Britujo.”

— Red.

Mondaniga Deklaro de Tomo-Urbo

La 20-an de dec., 1955, la urbo-deputitaro de Tomo (Numakuma-gun, Hiroŝima Prefektujo) unuanime akceptis la jenan projekton pri Mondaniga Deklaro proponitan de la urbestro mem:

“Kun la arda deziro por la eterna paco, la havenurbo de Tomo, kiu situas okupante, kiel Nacia Parko, parton de la bone-konata pitoreska Seto Enlanda Maro, konfirmas la celon de la Movado por Mondfederacio, kaj bonvenigas al si ĉiujn homojn el ĉiuj partoj sur la terglobo. Laŭ la supra konvinkigo ĝi deklaras kunlabori por la ĝenerala bonfarto de la tuta homaro.”

La urbo, kvankam malgranda, estas famekonata ne nur kiel turisma belloko, sed ankaŭ kiel la produkto de fero kaj ŝtalo.

Bonvolemaj samcelanoj estas petataj sendi gratul- kaj kuraĝig-leterojn al la urbestro!

Kune kun la supra, Japanujo nun havas 13 mondanigitajn komunumojn.

— Red.

Ĝenerala Kunveno de Japana Unuiĝo por Mondfederacia Registaro

21-22, jan., 1956, la Ĝenerala Kunveno de Japana Unuiĝo por Mondfederacia Registaro okazis en la halo de Urba Labor-Domo en Osaka por decidi la labor-programon por la kuranta jaro. Spite la vintran malvarmegon, ĝin partoprenis ĉ. 200 personoj el la tuta lando. Oni etuziasme diskutis pri organizo kaj estontaj aktivaj movadoj por en-kaj eksterlando. Atentinda i.a. estas la rezolucio pri la landskala akcelado de Mondaniga Deklaro de Japanaj urboj. La nuna kunveno estas la unua, kiu okazis ekster Tokio, kie sidas la centro de la nomita organizacio. Kaj la Kunveno estis fermita per la jena deklaro:

“La A- kaj H-bomboj, kies terurojn ni japanoj jam spertis en Hiroŝima, Nagasaki, kaj aliloke nun minacas la vivon de la homaro. Ĉiuj eminentaj sciencistoj de la mondo avertas ke se atomenergia milito okazus, ĝi nepre pereigus la tutan popolon de la mondo.

En tiu ĉi kriza momento la ĝenerala voĉo de l' homaro estas decide por paco. Kaj tamen, la nura kriadlo pri paco neniom pavimos la vojon konkrete al la mondpaco.

Ni, mondfederalistoj, kredas ke por malebligi militon ni bezonas antaŭ ĉio starigi la

novan ordon bazitan sur la mondleĝo, elfarota ne sole de ŝtataj administrantoj, sed ankaŭ de la popoloj de la mondo kunlabore. Tial ni alvokas:

1. Ke ĉiuj ŝtatoj rezignu pri milito sekvante la ekzemplon de Japanujo;
2. Ke UNO havu en si ĉiujn naciojn de la mondo kiel membrojn;
3. Ke la Ĝenerala Kunveno de UNO kunvoku samtempe ankaŭ Kunvenon de Popol-Representantoj elektitaj proporcie kun la nombro de ĉiuj naciaj loĝantaroj;
4. Ke la Mondpopola Kongreso estu okazigita por elfari la provaĵon de Monda Konstitucio kiel la unua konkreta projekto de la Mondfederacio.”

— Red.



La Ĝenerala Kunveno en la halo de Urba Labor-Domo en Osaka



★ EL LA MANIKO: Originala novelaro de Reto Rossetti, eld. de STAFETO, — J. Régulo (eldonisto), La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955; 224 paĝoj (16 × 22.5 cm.); Prezo 12 anglaj ŝilingoj aŭ 1.08 uson. dol. plus sendkosto.

STAFETO jam fariĝis al ni la familiara nomo pro la imponaj beletristikaj libroj, kiujn sinsekve ĝi eldonis post la dua mondmilito. Jam aperis ĝis nun kvin volumoj, kaj tamen mia nuna tasko estas recenzi N-ron 3 de ĝia eldonserio.

Dek-kvin noveletoj entute. Unuvorte: Beletristika provo, en kiu la aŭtoro uzis senrezerve la poezian lingvon en prozo — en la iom ĵurnalisme konciza stilo plena de “novaj” vortoj. Kaj en tio — kiel la skulptisto, kiu konas siajn metion kaj ilaron — li tre lerte manipulas nian lingvon. Alivorte, kvazaŭ ĵonglisto sian arton “el la maniko”! Kaj en tiu ĉi senco EL LA MANIKO tre interesis min. En la novelo *Francisko la fuŝulo* kaj la du detektivecaj noveloj, *La Tripieda Teruro* kaj *La Kaprica Kadavro*, Rossetti apenaŭ sukcesas kiel novelisto — nekomparebla kun Rossetti la poeto en KVAROPO.

La “verkema okulo” de la aŭtoro estas mirinde akra: per ĝi li kapablas envortigi eĉ tre banalajn aktualaĵojn de nia vivo tiel koncize, kiel ekz-e: “Li manipulis sian fotilon kaj rigardis tra la celilo — Li pafis, turnis la anseton ĝis la sekva numero”. (p. 14). / “Li vaste ekspiris kaj kun elasta paŝo supreniris la ŝtupojn po duopo. La manrelo, glitanta tra lia polmo, ekiĝis nivela: jen la supro.” (p. 20, *polmo* = manplato). / “Ili ascendis per la lifto ĝis la kvara etaĝo, iris laŭ la tapiŝita koridoro tra du anguloj, kaj venis al la apartamento 28. La pordistino volis premi la sonorbutonon, sed Merlin ekrimarkis: ‘La pordo ne estas fermita’. Efektive ĝi staris iomete dise, montrante strion de la pordfosto. ‘Permesu’ diris Merlin, kaj li milde ŝovmalfermis la pordon.” (p. 192)

Sennombre daŭrus tiaj ekzemploj. Ankaŭ estas multaj kunmetitaj vortoj, kiuj (ĉu uzitaj de li unue, mi ne scias, tamen) riĉigas nian vortoprovizon, kiel *letertruo*, *leterklapo*, *klapopordo*, *gaskrano*, *kranbiero*, *ŝaŭmokresto* (de biero en glaso) ktp.

Li tamen, kiel jam dirite, uzas abundon da neologismoj (el kiuj *nur* 65 estas “klarigitaj”), tiom ke eĉ *primitivan* impreson donas la vortoj “skribmaŝino” kaj “vagonaro”, kiujn li efektive uzas, same kiel “torĉo” por ia manportebla lumigilo en la moderna senco! La ambicio de la aŭtoro ŝajnas aŭ raketi ĉiam per pompaj vortoj, aŭ paradi ĉiam per novismaj frazoj. Kvankam tio estas artifice surpriza kaj bela, tamen ofte donas ne-naturan tonon kaj al la konversacio kaj al la priskriboj. Efektive, (permesu al mi, demandi) kio novela estas la unua peco *Ho, egoisto* minus tia spektakla lingvaĵa elmontrado? Por riproĉi sian fraton, ĉu oni uzus tiajn

tondro-monstrajn ekkriojn kiel *Protokreteno!* *Arkiazeno!* *Herbokranio!* —? Ĉu oni en sia sobra parolo babilus al sia kolego tiel beletre, kiel: “Ne bombardu tiel dense! Pli lante, kara homo!” (en la senco: Ne tro detale, sed mallonge klarigu! p. 211). Kvazaŭ dramecaj strofoj! Same beletre, en *La Taglibro de Aleksandro Zoffany*, flustras sian romantikan amon la lerneja knabineto kaj la mezaĝa fraŭlo-profesoro! Ilia tuta konversacio (kvankam skribita en la formo de taglibro) sonas kvazaŭ el ia klasika teatraĵo prezentata en ia malklasika lingvo. Ĝi eble estus bela, sed nenatura, malaktuala kaj ne ĉiam konvena por la prozo. Jen kial mi atribuas la “eksperimentan” karakteron al la formo de la novelaro kaj ne okupiĝos pri la problemoj de la neologismoj en ĝi uzitaj. Sed la sola escepto estu pri la vorto *degni*.

degni en Poezia Fakvortaro signifas: “Bonvoli fari ion al *malaltr*anguloj, afable, sed tamen sentigante sian moŝtecon”. kaj en tiu signifo ĝi estas uzita ankaŭ en KVAROPO. Sed nun — en la Vortklarigo de la recenzata libro oni klarigas: “Moŝte bonvoli, sentigante sian superecon”. Kaj la koncerna vorto estas uzita sur p. 69, kie temas pri du “klaskamaradoj” — do *egal*anguloj! Kial modifi la vortodifinon tiel facile laŭ sia bezono?

Same arbitra estas la enkonduko de la interjekcioj, el kiuj multaj estas nuraj vortoj aŭ krioj “sen-elvokaj” kaj kelkaj sonas kurioze, eĉ kontraŭ-sence al niaj orientanaj oreloj. Ĉio ĉi tamen estu bonvena, se temas pri la provo riĉigi nian lingvon. Mi rekomendas la libron al ĉiuj legantoj, kiuj interesiĝas en la beletristiko! T. Mikami

★ ESPERANTO BILD-LEGOLIBRO: Verkita de s-ro Kotohiko Macubara,

revizita de s-ro Kenji Ossaka; eld. de AMO-AKADEMIO (Tenmori, Ŝidami, Morijama-ŝi, Aiĉi-ken, Japanujo). 168 paĝoj; 15.2 × 21.3 cm.; prezo: ¥ 270.

Japanoj havas jam multajn memlernolibrojn de Esp. Ĉi tiuj estas kompletaj kun la gramatikaj klarigoj kaj iuj estas eĉ tro kompletaj kaj tial komplikaj por la japanaj “komencantoj”, kiuj ne scias eŭropan lingvon. Tamen la nove eldonita Bild-Legolibro estas ĝuste konvena por tiaj komencantoj kaj en tia senco — unika. La teksto estas skribita en japanlingvo, tamen malgraŭ tio, alilandanoj ankaŭ povos bone lerni per ĝi, ĉar la multaj ilustritaj bildoj en akompano de konvenaj vortoj kaj frazoj estas tiel lerte aranĝitaj ke ili ne donas tro grandan gramatikan ŝarĝon al la lernanto. La libro sin bazas sur la praktikeco de nia lingvo.

Aparte bonvenaj estas la specialaj paĝoj por la nomaro de diversaj vivfamiliaraj materialoj kun bildoj: ekz. floraro, bestaro, veturilaro, muzikinstrumentaro, k. c. donas utilon ne nur al la komencantoj.

La preso estas bela. Bedaŭreto estas ke nur du bildoj malakordas kun la teksto, t. e. (p. 61) la kvara kaj kvina bildoj devas esti interŝanĝitaj.

La libro estas por japanaj memlernantoj, sed rekomendebla ankaŭ por alilandanoj. Mi nun utiligas ĝin en mia elementa kurso por konversacia ekzercado, kaj rikoltas bonajn rezultojn el la praktika vidpunkto. J. Umeda



★ KIO ESTAS LA VERO de Martinus. El la dana originalo tradukis C. Graversen. Kontrolita de Literatura Komitato de

SAT. Eld. de Esp-sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus (Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F.

Danujo); formato: 13 × 19 cm.; 95 paĝoj; prezo: 6,50 danaj kronoj.

Kio estas la vero? Tiu demando por ĉiam estas aktuala kaj tre grava, ĉar nur la vero forigos la faoson de la mondo. La recenzanto havas la intereson kaj simpatian al la kosmologiaj ideoj de Martinus ekde la unua kontaktiĝo kun lia unua Esp-a libro "La Honoro kaj la Mondbildo". Tamen, traŝirante la libron, "Kio estas la vero", mi devas malkaŝi mian bedaŭron, ke mi ne legis tion, kion mi imagis kaj atendis el la titolo mem! Se mi unue vidus la tabelon de l' enhavo, metitan en la lastaj paĝoj de la libro, mi estus bone direktita. Jen kelkaj titoloj el ĉiuj 30 ĉapitroj de l' libro: Jesuo estis reĝo (2-a ĉap.); Kial Pilato liberigis la rabiston anstataŭ Jesuon (4-a); La vera reĝodigno (5-a); La reĝodigno degeneris (7-a); Nova fazo en la mondsava revelacio de la Vero (9-a); Falsaj profetoj, mesioj aŭ mondsavantoj (16-a); Kion Kristo mem diris pri sia reveno (19-a); Kial "la reveno de Kristo" ne montriĝos kiel ia objekto por kredo kaj adoro (20-a); Kion la mondsavado respondas al verserĉado de intelekto kaj humane stampita estulo (28-a); La scienco de amo al proksimumo (29-a).

Kiel la cititaj temoj rakontas, la argumento sin bazas sur Kristanismo. En tio mi aprobas la celon kaj konkludon de lia argumento. Sed mi jam de antaŭe atendas ke li, racie scienca kosmologo, iam klarigos la *veron* pri la interrilato de la korpo kaj animo, la reala mondo kaj la spirita mondo. Se temas pri la *vero*, tiu ĉi afero estas tre grava, ankaŭ por spiritualistaj rondoj, ĉar iliaj ideoj ne ĉiam koincidas en detaloj. Se Martinus jam predikis tion kaj eldonis pri tio nacilingvan libron, mi esperas ke la Esp-sekcio de la Instituto publikigos la

esp-an tradukon.

Malgraŭ tio, la nuna libro estas skribita en bonegaj rezono kaj esp-a stilo. Kvankam la ideo pritraktita en ĝi verŝajne estas jam konfirmata de ĉiuj intelektuloj kaj bonmoraluloj, ĝi tamen multe helpas plifirmigi ilian kredon kaj prilumos la vojon al "erarvagantaj ŝafidoj". La aktiveco de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus ja estas gratulinda!

N. Omosu

★ KOKO KRIAS JAM! Originala novelaro. STAFETO, Belliteratura eldonserio, 4—J. Régulo, eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955.—16 × 22.5 cm.—232 paĝoj—Prezo: 12 anglaj ŝilingoj aŭ 1.80 usonaj dolaroj plus send-kostoj.

Agrable vidiĝas la pure seriozaj viv-sintenoj de izolulaj animoj ĉirkaŭe de vulgare oftaj abismo kaj lavango sur la unua parto: "LA FLAM-SALAMANDRO," kiu okupas la du-trionojn de la unua parto, kaj sekvas la tute ne antaŭvidita mala kontrastaĵo, la dua parto: "FACILA VENTO," kiu sendadas senĉese ĉien la diverskolorajn foliojn, kies bonodora aspergado riĉe varias: jen humora ironieto, jen ekscitita ekridego.

Laŭ la skizo de kruda impreso la dua parto, kiu konsistas el 6 rakontoj, aspektas pli superi en ia senco ol la unua parto, en kiu troviĝas 7 originalaj noveloj. Tio kaŭzus malplezuron al la aŭtoro, kiu nun sekretariis la Belartajn Konkurojn de UEA, redaktas la kulturan revuon "Norda Prismo" kaj al kies poezio mi konstante havas mal-avaran estimigon. Kvankam mi ne ĉiam volonte konsentas tian pesimisman opinion, ke rilate originalajn verkojn, almenaŭ escepte de la poezio, Esperanto ankaŭ piedfrapadas antaŭ la tagiĝo, mi tamen spertis, por tiel diri, iom da

disreŝiĝo, trafoliuminte la libron kun tia espero kia pri "Koko krias jam!"

Probable la virtuoza animo de novelo ankoraŭ ne trovas en Esperantujo la plej taŭgan personon, en kiun ĝi enkorpiĝos.

Fakte la temoj de preskaŭ ĉiuj noveloj aŭ mallongaj rakontetoj en la unua parto koncernas al la vivoj sub la milita minaco, sed la aŭtoro observas kaj raportas tiom objektivaj kaj indiferente, ke senespera aŭ enuiga mal-kontento ofte ĉagrenas la legantojn, spite de tio ke ili tie kaj ĉi tie renkontas kaj admiras la rafinitan esprimon kun lertaj aranĝoj de koncizaj vortoj. Tiu mal-kontento eble similas al la malbon-humora agitiĝo kaŭzita de frekventa malbon-funkciado de televido-aparato.

Sed tamen estas evidente, ke la frazoj, kiuj glate fluadas en ĉi tiuj noveloj, havas ja propran distingecon, kió estas eble la honesta respeguliĝo de la karaktero de la aŭtoro mem. Tio estas, kvazaŭ li, eminenta poeto, aplikus la esencon de japana hajko aŭ tuĉ-pentrarto, ĉar en la hajkon nature ensorbiĝas la spirito reprezentata de la devizo de Baŝo Macuo, la virtuoza de japana hajko, "Eniru pli profunden kaj eliru malprofunde". Kaj, kun kelke da esceptoj japana tuĉ-pentrarto ĝenerale donas impresojn jenajn: trankvila, simpla, senafekta, kaj eĉ indiferenta.

Ĝuste kun tia nuanco la aŭtoro rakontas en sia novelaro.

Ŝajnas, ke li ne intencas, aŭ intence evitas agiti la malamon aŭ indignon kontraŭ la milito kaj ĝiaj tiranecaj perfortemoj sub la bataloj, kaj tial ofte li kamuflis per belaj vualoj de simbolaj frazoj.

Kvar fortaj junaj, de malsato sovaĝaj rabobestoj de la milito

kaj unu juna, virina korpo.

Iu mondo kolapsis (P.44)

Eĉ kun tiaj supervaloraj frazoj la plej altrangaj noveloj esperantaj donas tian impreson ke ili ankoraŭ restas en malpli alta nivelo kompare kun tiuj de naciaj lingvoj. La problemoj estas tro grava por mi ĉi tie diskuti.

*

"La flamsalamandro" estas en la libro la plej longa novelo, en kiu verŝajne la aŭtoro metafore aludas, kiel la homvivo vundiĝas aŭ interrompiĝas pro la neeviteblaj hazardaj okazintaĵoj — pere de la historieto pri salamandro, kiu mortis nur pro la subita malapero de la baseno kun akvo ĝuste tiam, kiam ĝi estis ŝanĝanta sian haŭton por aperigi en la nova vesto. La kurioza fino ankaŭ implicite indikas la altnivelan percepton de l' homvivo tra rezignacio.

"La vekigi" estas la refreŝiga mallonga rakonteto, kiu prefere apartenas al la kategorio de "LA FACILA VENTO". Junuleca aventuro hazarde kunligiĝas kun la kunveno de Esperantisto, kaj superfluas tie la gaja ĉarmo kaj juna revo.

"Koko krias jam!" estas unika novelo en la tuta volumo. Eble pro forta ensorbiĝo de travivaĵo de la aŭtoro mem, la pentritaj scenoj estas tiom hellume klaraj kaj konkrete detalaj, ke precizaj skribplumoj atingas en bona fokuso ne nur ĉiu-flanken sed ankaŭ eĉ malproksiman angulon tute malsimile al la aliaj noveloj. En la frazoj ekzakte reapertigitaj estas la ŝanĝiĝo kaj transiro de mens-cerbumado de la heroo post senlaca psikologia esplorado. Vere, kiel rimarkis la aŭtoro, la ĉefa "celo de ĉi tiu novelo estas en iu maniero rekonstrui la momenton, kiam nobla homo kun virtoj kaj ankaŭ

malfortaĵoj staras antaŭ la momento de la decido," tiel bone elĉerpas la legantoj la dilemon de la heroo, Henriko Dunant kaj ĉe la fino akute kaj profunde kunploros kun li lian angoran ĉargrenon, kiu vere estas maldolĉa, peza, komplika, mult-ingredienca vira ploro.

*

Apenaŭ oni foliumis la "pordon", la titolpaĝon de la dua parto, oni tuj eksentas mole ŝvebi la facilan venton super ĉiuj literoj de la tuta paĝo. La titolo "Facila Vento" ne trompas, kaj oni baldaŭ trovos sin mem en la centro de l' fonto de humoro kaj sprito, provizita de varma ripozejo, en kiu oni ne nur povas plengui la plej rafinitajn ridindaĵojn sed ankaŭ samtempe senkonscie preni la nutraĵon por riĉigi sian Esperantistan vivon.

En "Komposta Komploto aŭ Kompoto" la aŭtoro tre plendas pri Koboldo, "presdiablo" aŭ diablo de la preseraroj, kaj rakontante amaran akcidenton li preĝas, ke sinjoroj Koboldo kaj Kompostisto estimu la Nobel-premiitojn, sed tamen ĉe la fino li kapitulacis kaj enfalis en rezignacian frenezemon, kriante "Ktrzedzimripppĉum!" (ne komprenebla al mi).

"La ĉefministro de Svedlando" estas nur la komedioto kun vortludo, kiun la aŭtoro tre ŝatas. "F. Schiller ne vivis vane!" entenas la plej bongustan ŝercon kaj altvaloran kapricon inter ĉiuj rakontoj. Lia lertega rakontmaniero tiom efike koncentriĝas, ke eĉ en kompleksa materialo kaj rapida tono neniun senutila vorto troviĝas, ĉiu el ili streĉe kunligas unu kun la alia kaj faras belegan akordon. Al mi tre plaĉas, interalie, jenaj vortoj kriataj, kiam li

sukcesis kontroli la kaprican sovaĝĉevalon, Halda (skrib-maŝino) post longa dresado: "Halda komprenis, ke la vivo estas io alia ol la fieraj sonĝoj de la juneco."

En "Lumdiboĉo kaj Lumofesto" kun admiro al Skandinavio kiel vera paradizo li mistike komencas la prezentadon de la stranga kutimo en la lumbenata lando, la festo "Lucia Nokto," kiu okazas dum la nokto de la 12-13a de decembro. La rakonto iom aspektas fabelo. "Konciza Koresponda Kurso pri la Amo" estas komedio rilata al miskompreno de la saluto en la letero de korespondado, ŝercema sed serioza estas la fino. Tie estas avertite, ke lingvoj ne konsistas nur el vortoj. Malantaŭ la vortoj estas lingvaj kutimoj, efikoj de diversaj faktoroj, pri kiuj la vortaro diris nenion.

*

En konkludo mi ne avaras frapi la manojn parte pro la respekto rekte al la estimata aŭtoro, parte pro aplaŭdo al la eldonisto, ne parolante jam la altvaloran kontribuon de ili ambaŭ al la Esp-a literaturo. La libro "Koko krias jam!" nepre okupos la neforlaseblan sidejon en la biblioteko de ĉiuj Esperantistoj.

Masayuki Kuroda

Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

50. S-ro M. Arger, Parizo, Francujo: semoj de *Fritillaria imperialis* L.
51. S-ro R. Portner, Osijek, Jugoslavujo: semoj de 11-specaj floroj kaj legomoj

Poŝtmarka Informo en 1956 (1)

Haruja Maekaŭa



R 1) 18, Feb. — Memoriga poŝtmarko per la 6-a Arbariga Semajno.

Valoro: 4 enoj. Koloro: bluverda. Preso: fotogravura. Formato: 22.5 × 27 mm. Aranĝo de folio: 10 × 5. Eldon-nombro: 200,000.

La semajno okazis de la 18-a ĝis la 25-a de Februaro, 1956. La poŝtmarko montras V-forme simboligitajn arbojn.

Avizo:

2, Aprilo — 10-ena memoriga poŝtmarko por la 23-a Monda Ĉampioneca Konkurso pri Tablotenisio eldoniĝos.

3, Majo — 10-ena memoriga poŝtmarko por la I-a Monda Ĉampioneca Konkurso pri Ĵudo eldoniĝos.

— Rjukju-Insularo —

Aprilo — 4-ena memoriga poŝtmarko pri Inaĝuro de aŭtomata telefono.

Gloro Ekstermiĝo

Malamikaj du kampoj.

Du ideoj

inspiritaj de sama drenkanalo,
faris ke, kondukataj de fatalo,
du patroloj eksaltis el tranĉeoj

noktomeze.

Kuniĝo, krioj, veoj,
patriota buĉado... bakanalo
sanga, murda kaj poste...

silentfalo
sen militaj ordonoj kaj oĉeoj.

Kiel mi abomenas la kutimojn
perfortantaj milite kaj detruie,
plenumantaj konscie tiajn krimojn...

La gazetoj proklamas ilin brue,
la tagordoj glorigas la viktimojn,
la patrinaj protestas sed malfrue.

Saldanha Carreira, Lisboa

En Arbardensejo

Kion rakontas la Arbohakisto, demandite de l' Jurpolicisto

Jes, via moŝto. Mi certigas vin, ke estas mi, kiu trovis la kadavron. Hodiaŭ matene mi iris kiel kutime dehaki cedrojn en la malantaŭa monto. Kaj okaze, en la arbardensejo sub la monto mi trovis la kadavron. En kiu loko la kadavro kuŝis? Nu, eble kvar aŭ kvin ĉoojn^① distanca de la stadivojo de Jamaŝina, — ĝi estas dezerta loko kun la bambuoj kreskantaj mikse kun la nedikaj cedroj.

La kadavron, kiu ankoraŭ surhavis la superveston helindigan kaj la altĉapon Urbo-modan, mi trovis tie kuŝanta sur la dorso. Ja per sola glav-bato, tamen en la bruston li estas trapikita, tiel ke la tuta bambua sekfoliaro ĉirkaŭ la kadavro estis kvazaŭ sapane^② ŝmirita. Ne, via moŝto, jam ne sangis el ĝi. Kaj la pikvundo ankaŭ estis sekiĝinta laŭ mia memoro. Cetere, sur ĝi estis suĉ-gluiĝinta unu ĉevalmuŝo surde al la bruo de miaj paŝoj — tion mi rememoris.

Ĉu glavon aŭ ion alian mi ne trovis? Ne, nenion — krom strio de ŝnuro lasita sub la apuda cedro. Kaj — nu jes, mi ĵus rememoris, ke krom la ŝnuro mi trovis ankaŭ virinan kombilon. Estas nur tiuj du, kiujn mi trovis ĉirkaŭ la kadavro. Sed ĉar mi trovis surloke la herbetojn kaj bambuajn sekfoliojn distretitaj ĉiudirekten, mi ne dubas, ke la viro tre forte agadis antaŭ ol li estis mortigita. Kio? Ĉu ĉevalon mi ne vidis? Oni vidu, la loko tute ne estas por ĉevalo alirebla, ĉar ĝi estas tiel izolita ke la vojeto por ĉevaliro kuŝas ankoraŭ for trans tuta arbardensejo.

*Kion rakontas la vojaĝanta Budapastro,
demandite de l' Jurpolicisto*

La viron, nun en kadavro, mi certe rekontis hieraŭ. Hieraŭ — nu, ĉirkaŭ tagmezo. La loko estas sur la vojo kie oni iras de la Sekijama-barejo al Jamaŝina. La viro piediris direkte al la Sekijama-barejo en akompano de virino rajdanta sur ĉevalo. La virino surhavis la ĉirkaŭ-vualon pendanta, kaj ŝia vizaĝo al mi ne estis videbla. Kion mi vidis pri ŝi, estis nur la koloro de vestaĵo, kiu ŝajnis al mi la

duobla-kompleto el la verda kaj nigruĝa koloroj. La ĉevalo estis helkolora kaj, se mi ne eraras, kun la razita kolhararo. Pri ĝia alteco? La alteco eble de kvar ki-oj^③, ĉu mi diru? — Tamen ĉar bonzo mi estas, mi timas, ke tian aferon mi ne bone distingis. La viro — ne, via moŝto, li ja portis kaj glavon ĉe la zono kaj pafarkon kun sagoi. Aparte, pri la nigre-lakita sagujo kun sagoj ĉirkaŭ dudek entenitaj mi eĉ nun povas prezenti al mi la precizan bildon.

Kaj tamen, ve, kial mi tiam povus imagi al mi eĉ en sonĝo, ke la kompatinda viro fariĝos tia! Vere, la vivo de homo estas tiel pasema kiel roso kaj kiel fulmo! Ve-ve, mian kompaton al li — bedaŭrata, ke tia sorto povis lin trafi!

Kion rakontas la Gardisto, demandite de l' Jurpolicisto

Ĉu vi demandas pri la viro, kiun mi arestis, moŝto? Tiu certe estas la fama rabisto nomata Taĵomaru. Tamen, kiam lin mi arestis, li — kredeble falinta de sur ĉevalo — estis ĝemeganta sur la ŝtonponteto ĉe Aŭatazuĉi. Pri la horo? La horo — estis ĉirkaŭ la unua kvinono^④, hieraŭ nokte. Iam antaŭe, kiam mi lin vane arestis, li tiam ankaŭ surhavis la superveston malhelbluan kaj portis ĉe la zono la glavon kies ingo estis relieformama, la samajn kiel ĉi tiuj. Kaj nun, kiel vi vidas, li havas kun si, krom tiuj, ankaŭ tian sortimenton da pafarko kaj sagoj. Ĉu vere, moŝto? Ĉu la samajn ankaŭ la viro, nun en kadavro, havis! — Do la atencinto je murdo povas esti neniu alia ol ĉi tiu Taĵomaru! Jen la pafarko kun la tenilo volvita per led-ŝnuro, jen la nigre-lakita sagujo, jen la dek-ses sagoj astur-plumaj — ĉi tiuj devas esti la aĵoj, kiuj ĉiuj apartenis al la viro. Jes, kiel vi diras, la ĉevalo, kiun mi ankaŭ vidis, estis helkolora kun la razita kolhararo. Ja, sendube ke la besto defaligis la rabiston, tio ne povas okazi sen certa pago pro lia ago! La ĉevalo, trenante post si la longan rimenon, manĝis la junajn miskantojn ĉe vojrande iom fore trans la ŝton-ponteto.

Taĵomaru la aĉulo estas plej virin-ŝatema el ĉiuj konataj rabistoj, kiuj vagas en la Urbo. En la aŭtuno de la lasta jaro okazis, ke en la monto malantaŭ la Pindolo^⑤ de Toribe-templo oni trovis mortintan virinon en akompano de knabeto, kiu verŝajne kune venis tien pro ia pet-preĝo. Kaj ankaŭ tiuokaze mi aŭdis, ke oni atribuis la atencaĵon al tiu ĉi aĉulo. Tial ankaŭ en la nuna okazo oni povas suspekti kion ajn kaj kie ajn la aĉulo — se li mortigis la viron — plenumis al la virino, kiu rajdis sur la helkolora. Permesu, ke mi min trudus, sed bonvolu enketi ankaŭ tion, mi petas.

Kion rakontas la Maljunulino, demandite de l' Jurpolicisto

Jes, via moŝto, la kadavro estas de la viro, kies edzino estas mia filinjo. Sed li ne estas Urbano. Li estas samurajo^⑥ en la Prefektujo de Ŭakasa. Lia nomo estas Takehiro Kanazaŭa. Lia aĝo estas dudek-ses-jara. Tute ne, moŝto, ĉar li estas de ĝentila temperamento, al li tute ne povas esti alies venĝo.

Pri mia filinjo? La nomo de mia filinjo estas Masago, ŝia aĝo dek-naŭ-jara. Ŝi estas la injo fortanima, ne malpli ol viro, sed viron ŝi tute ne konis krom Takehiro. Ŝia vizaĝo en la nuanco bruneta — estas eta ovala vizaĝo kun

haŭtmakulo apud la okulangulo maldekstra.

Takehiro kun mia filinjo ekvojaĝis hieraŭ al Ŭakasa, kaj survoje — ho ve, el kia ago rezultis tia mizero, kia trafis ilin! Kaj — kio nun okazas kun mia filinjo, tio sola ĉagrenas min, eĉ se mi jam povas resignacii pri la sorto de mia bofilo! Permesu al mi, kadukulino, ke mi faru al vi la plej grandan peton en mia vivo; bonvolu eltrovi ŝian kieeston, serĉante ŝin eĉ el inter hertoj kaj arboj! Pro ĉio, kio okazis, mi ĉiuokaze malamegas tiun rabistaĉon, kiu estas nomata, Tajomaru aŭ kio, mi ne scias! Ne sole mian bofilon, sed ankaŭ mian filinjon li... (Ŝi eksplodas en ploron, tiel ke ne plu daŭras ŝia parolo.)

Kion konfesas Tajomaru

Kiu la viron mortigis estas mi. Sed la virinon mi ja ne mortigis. Do kien ŝi iris? Nu, pri tio ankaŭ mi ne scias. — Atendu momenton! Torturu min kiom ajn vi volas, sed mi ne povas eldiri kion mi ne scias. Kaj cetere, por kio mi, falinte jam en ĉi tia stato, malnoble kondukus kaŝante al vi ion?

Mi renkontis la geedzan paron hieraŭ iom post tagmezo. Tiam la pendanta silko de la ĉirkaŭ-vualo de la virino eklirtis per kaprica venteto kaj momente mi vidis ŝian vizaĝon. Momente — jes, kaj en la posta momento ĝi jam fariĝis ne videbla, kaj ja estas parte pro tio, ke ŝia vizaĝo aspektis al mi la bodisatv-angelina. Sub la momenta impulso mi decidis ke la virinon mi forrabu eĉ se la viron mi mortigus.

Tute ne, mortigi viron estas ne tiel grava afero kiel vi ĉiuj imagas al vi! Por ke mi forrabu la virinon, la viro ĉiuokaze bezonas esti mortigita. Sed se mi mortigas, mi peruzas la glavon de la zono. Tamen vi ĉiuj ne uzas glavon; vi mortigas homon nur per aŭtoritata povo, mortigas per mono, mortigas foje, mi scias, eĉ nur per miea duŝo de virtaj vortoj! Certe, tiaokaze la sango ne elfluas el li kaj la viro vivos en plena vivo, kaj malgraŭ ĉio vi ja murdis lin! Mezuru la profundecon de niaj pekoj kaj juĝu, ĉu efektive mi estas pli malica ol vi, aŭ vi ĉiuj estas pli malicaĵ ol mi? Kiu scias? (Ironia rideto.)

Kaj tamen se mi povus forrabi la virinon sen mortigi la viron, tio estas ja kompleta. Jes, kaj en mia koro de la momento mi decidis forrabi la virinon, kiom nur eble, ne mortiginte la viron. Tamen, sur la stadivojo de Jamaŝina, kie ni estis, tio tute ne estas plenumbla. Tial mi planis unue enkonduki la geedzan paron en la monton.

Tio ĉi estis nenio malfacila por mi. Kiam mi vojiris kun la geedza paro mi rakontis — ke en la jena monto kuŝas malnova tombaltaĵo, mi ĝin malkovris kaj elstosis grandan amason da speguloj kaj glavoj, mi tiujn kaŝ-enterigis en arbardensejon apud la monto, kaj mi volas disvendi kion ajn por malalta prezo al ĉiu, kiu deziras. Mia rakonto iom post iom agitis la koron al la viro. Kaj — vidu! Kiel terura estas la avareco! Estis nur malmultan tempon deposte, ke la geedza paro kun mi jam iris kondukante la ĉevalon direkte al la montovojo!

Kiam ni alvenis ĵus antaŭ la arbardensejo, mi diris, ke tie miaj trezoroj estas enterigitaj, kaj ke ili venu kun mi por vidi. La viro estas soifanta al avaro kaj pro kio li rifuzus? Sed la virino ne volis eĉ deĉevaliĝi dirante ke ŝi atendos tie.

Certe kun ŝi konsentus ĉiu, kiu vidus propra-okule la densan kreskon de la arbaro! En tio tamen, por diri la veron miaflanke, la afero iris mendite; tial mi kun la viro eniris la densejon postlasinte la virinon sola.

La arbardensejo ĵe kelka distanco komence estas sole kun la bambuoj. Sed kiam ni iris la distancon de ĉirkaŭ duon-ĉoo^①, tie estis la cedro-arbaro kun iom malplena loko — la loko plej konvena por plenumi mian taskon. Disbatante la kreskaĵojn en la densejo antaŭ ni, mi lerte mensogis al li ke miaj trezoroj estas enterigitaj sub la jena cedro. Apenaŭ la viro aŭdis tion de mi, li jam impetis antaŭen en la direkton de la nedika cedro, kiu estis trasidebla. La bambuoj fariĝas pli kaj pli sporadaj kaj la cedroj staras en multaj vicoj — kaj apenaŭ ni alvenis tien, mi subite subigis mian kunulon perforte. La viro, laŭ la merito ke li portas glavon, estis sufiĉe fortega, sed vane, ĉar li estis atakita en la momento de lia plena malpreteco. Li tuj estis ŝnur-ligita sub la cedron. La ŝnuron? Oh, mi dankas al mia rabisteco, ke mi ĝin ĉiam portas ĉe mia zono, preta por uzo kiam mi trans-grimpas barilon! Nu, se mi jam enŝtopis al li la buŝon per amaso da bambuaj sekfolioj kompreneble por ankaŭ malhelpi al li eligi la voĉon, jam restas nenio cetera, kio estas malfacila!

Post kiam mi tiel aranĝis la viron sub mia mano, mi reiris al la virino por diri, ke ŝi volu veni ĉar la viro suferas atakite de subita malsano. Senbezone diri, ke mia celo denove estas trafita. La virino kun la plekt-ĉapelo demetita en la manon venis en la internon de la arbardensejo kondukate de mi per mano. Tamen tien ŝi venis nur por trovi la viron ligitan sub la cedro. Apenaŭ ŝi vidis tion, — mi fakte ne sciis kiam el sia sino ŝi eligis ĝin — ŝi elingigis brilan glaveton preta. Mi ĝis hodiaŭ neniam renkontis eĉ unu virinon, kiu estas tiel sever-temperamenta kiel ŝi! Se mi estus malatenta en la momento, mi certe estus pikita unu-puŝe en la flankon. Eĉ se mi defendus min per flirta moviĝo de korpo, kiu sciis ĉu mi povis esti senvunda de ŝia blindega atakado. Kaj tamen mi estas Tajomaru la fama! Mi ĉiel kaj fine sukcesis frap-faligi al ŝi la glaveton el ŝia mano — mi mem ne uzante mian glavon. Kiom ajn estu sever-temperamenta, ŝi jam estas senhelpa — sen propra defendilo! Mi fine, kiel mi deziris, sukcesis la virinon enmanigi al mi sen forrabi la vivon al la viro!

Sen forrabi la vivon al la viro — jes. Mi eĉ tiam ankoraŭ ne havis la intencon mortigi lin. Tamen, kiam mi estis ĵus forkuranta ekster la arbardensejon, postlasinte la virinon kiu kuŝis vizaĝ-al-tere plorante, ŝi abrupte sin ĵetis sur min kaj frenezule alproĉiĝis sur mia brako. Kaj kion mi aŭdis el la plorintermitaj vortoj, kiujn ŝi elkriis: “Mortu, mi petas, aŭ vi aŭ mia edzo! Mortu, mi petas, iu el ambaŭ! Por mi — pli ol morti estas netolereble, ke mia honto estas dividita de la du viroj!” Spiregante ŝi daŭrigis eĉ: “Kiu ajn el ambaŭ postvivos, al tiu mi apartenos!” Ĝuste en tiu momento min atakis la furioza deziro, ke mi mortigu la viron! (Melankolia ekscitiĝo.)

Pro ĉio, kion mi ĵus rakontis al vi, vi sendube prenos min por homo pli kruela ol vi ĉiuj. Sed tio estas ĉar vi ne vidis la vizaĝon de la virino — ĉar vi ne vidis precipe ŝiajn flamantajn pupilojn en tiu momento. Kiam miaj okuloj kruciĝis kun la ŝiaj, mi volis ke mi edzinigu ŝin al mi, eĉ se pro tio mi estus mortfrapita de la Tondro! Ke mi edzinigu ŝin al mi — jen la afero, kiu sola tiam okupis mian

tutan menson. Tia ne estas malnobla sekspasio kiel vi ĉiuj juĝos. Se mi havus nur sekspasion kaj nenium alian deziron, mi jam forkurus deĵetinte ŝin eĉ per pied-frapego. Kaj tiaokaze ne estus okazinta al la viro, ke li tiel sangmakulis mian glavon. Sed kiam mi fiksis mian rigardon en la vizaĝon de la virino tra la duonhelo de la arbardensejo mi ekvolis, ke mi neniam forlasos la lokon antaŭ ol mi mortigis la viron.

Sed nun por mortigi la viron, mi ne volas mortigi en maldeca maniero. Malliginte unue la ŝnuron al la viro, mi diris, ke li venu al glav-duelo. — La ŝnuro kiun oni trovis sub la cedro estas kion mi forgesis tiam forĵeti. — La viro kun furiozanta mieno elingigis la dikan glavon kaj jam en la posta momento li muta kaj terura sin ĵetis kontraŭ min. — Mi ne bezonos diri kio rezultis el nia glav-duelo. Je la dudek-tri-foja krucigo mia glavo trapikis al mia parulo la bruston. Je la dudek-tri-foja krucigo!, tion bonvolu ne forgesi. Pro tio ĉi sola mi ja ankoraŭ memoras lin admire! Ĉar li estas la ununura viro en la mondo, kiu glavobatalis kun mi je pli ol dudek-tri-foja krucigo! (Gaja rideto.)

Samtempe kiam la viro falis, mi kun la sangmakulita glavo pendanta de mia mano min turnis al la virino. Sed jen — ĉu vi povus imagi al vi kio? Nenie mi povis trovi la virinon! Kiun direkton ŝi forkuris, mi priŝercis tra inter la ĉirkaŭaj cedroj, kaj tamen sur la bambua sekfoliaro ne estis ajna postsigno, kiu indikis ĝin. Mi akre streĉis miajn orelojn, sed kio venis en la orelojn estis nur la stertoro, venanta el la gorĝo de la agonianta viro.

Eventuale la virino — kiam ni komencis la glavinterbatalon — forkuris traŝovante sin el la densejon por venigi ies helpon. Ĉe tiu penso mi estis alarmita, ke nun mi vicas en risko — mi forrabinte la glavon kaj la pafarkon kun sagoj tuj eliris sur la montovojon de kie ni venis. Tie mi trovis la ĉevalon de la virino ankoraŭ paŝtanta trankvile. Kaj kio sekvis, tio estos superflua por diri per miaj propraj vortoj. Mi nur diru, ke la glavon mi jam forvendis antaŭ ol mi eniris la Urbon. — Mia tuta konfeso estas finita. En ĉiu okazo, mia kapo estas jam delonge oferita sur la meli-arban^o branĉon por pendigo; bonvolu do ne ŝpari al mi la plej severan punon. (Maltima sinteno.)

Kion pent-konfesas la Virino, veninta al la Kijomizu-templo

— La viro en la supervesto malhelblua, post kiam li perfortis min, moke ridis rigardante al mia edzo ŝnur-ligita. Kiel korŝire-bedaŭrega devis esti mia edzo! Ju pli li baraktegas, des pli enmordas la ŝnuro ĉirkaŭ-preme lian korpon! Impulse, mi ruliĝe alkuris apud mian edzon. Ne, mi intencis alkuri, kiam la viro pied-batis min kaj mi falis tie. Ĝuste tiam! — mi rekonis en la okuloj de mia edzo ion neesprimeble brilan. La neesprimeble brilan — la rememoro pri la okuloj eĉ nun ankoraŭ tremigas al mi la tutan korpon pro teruro! Per la okulumo de tiu momento, mia edzo, nekapabla eĉ unu vorton eligi, komunikis tamen al mi tutan sian koron. Kaj kio brilis en liaj okuloj ne estis de kolero, nek de malgajo — sed tio estis nur la malvarma lumo min malestimanta! Kvazaŭ frapita de lia okulumo, pli terure ol de la pied-bato de la viro, mi elkriis ion kaj forŝvenis.

Post iom da tempo, kiam mi apenaŭ rekonsciĝis, la viro en la supervesto

malhelblua estis malaperinta kien mi ne scias. Mi vidis nur la figuron de mia edzo ŝnur-ligita sub la cedro. Levinte mian duon-korpon sur la bambua sekfoliaro mi rigardadis al mia edzo en la vizaĝon. Kaj mi vidis la nuancon de lia okulumo tute senŝanĝa kiel antaŭe. Ĉiam ankoraŭ ĝi respegulas la nuancon de malamo en la fundo de la malvarma malestimo. Honto! Malgajo! Ofendiĝo! Mian bolantan emocijon de tiu momento mi ne povas nun bone esprimi. Ekstarante ŝanceliĝe, mi paŝis apud mian edzon.

“Mia kara, ĉio estas finita. Mi ne povas plu vivi kun vi. Mi decidis mortigi min per unu piko. Sed — sed mi petas, vi ankaŭ mortu kun mi. Vi vidis mian honton kaj vin mi ne povas lasi postvivi sola.” — jen kion mi diris al li per mia tuta forto. Sed mia edzo nur fiksdas sian malbenan rigardon al mi. Subigante al mi la krevontan koron mi ŝercis lian glavon. Sed kredeble ĝin jam forrabis la rabisto, ĉar ne nur la glavon, sed ankaŭ la pafarkon kaj la sagojn mi ne povis trovi en la arbardensejo. Tamen, feliĉe mi trovis mian glaveton kuŝanta apud mia piedo. Kiam mi ĝin tenis alte, mi diris al mia edzo ankoraŭfoje —

“Permesu, kaj donu al mi vian vivon. Mi ankaŭ vin tuj sekvos.”

Kiam mia edzo aŭdis ĉi tiujn vortojn, li por la unua fojo movis siajn lipojn. La voĉo estis tute ne aŭdebla kompreneble, ĉar lia buŝo estas plen-ŝtopita per bambuaj sekfolioj. Sed kiam mi vidis tion, mi tuj rekonis lian vorton. Ĉiam ankoraŭ kun la malestimo kontraŭ mi li subkomprenigis nur unu vorton — “Mortigu”. Preskaŭ en sonĝo mi enpikis lian bruston per mia glaveto tra la supervesto helindiga.

Post tio denove mi forŝvenis eble, ĉar kiam la konscio revenis al mi por rigardi mian ĉirkaŭaĵon, mia edzo estis elspirinta kun la korpo ŝnur-ligita. Sur lia mort-pala vizaĝo falis unu lum-strio de la okcidenta suno el la ĉielo tra la miksitaj pintoj de la cedroj kaj la bambuoj. Mi englutante la plorkrion malligis la ŝnuron al la kadavro kaj tian forĵetis. Kaj — kio okazis al mi poste? Por tion klarigi mi jam estas tro senforta. Ĉiuokaze, mi deposte povis neniel finiĝi al mi la vivon per mia forto. Mi provis enpiki mian gorĝon per glaveto, iam mi ĵetis min en laĝeton sub monto kaj provis ankoraŭ diversajn aliajn aferojn, sed mi hontu tiel longe, kiel mi ankoraŭ ĝisvivis! (Malfeliĉa rideto.) Mi estas tiel senhonta, ke eble eĉ la Avalokistevafa Diino de la granda kompatado kaj karito jam delonge forlasis min. Sed tamen mi — mi kiu mortigis mian edzon, mi kiu estis perfortita de la rabisto — kion mi faru? Kion — kion — mi —? (Subite furioza plersingultado.)

Kion rakontas la Spirito de la Mortinto per Mediumo

— La rabisto, post kiam li perfortis mian edzinon, — tie sidante sur sia postajo komencis ĉiel konsoli ŝin. Mi mem ne povas eligi la voĉon kompreneble. Mia korpo estas ŝnur-ligita sub la cedro. Sed dume, multajn fojojn mi sendis mian okulsignon al mia edzino. Ke ŝi ne kredu kion ajn la viro diras, ke ŝi ne estu mistifikita — ĉi tion mi volis komprenigi al ŝi. Sed korprenite, ŝi sidas sur la bambua sekfoliaro ĵetante sian vakan rigardon sur sian genuon. El tio tre verŝajnis al mi, ke ŝi eĉ atente aŭskultas la vortojn de la rabisto! Pro ĵaluzo mi baraktis dum la rabisto daŭrigis sian ruzan parolon seninterrompe. Ke jam mal-

purigita de alia viro, ŝi ne povos repaciĝi kun la edzo, ke ŝi edziniĝu al li prefere ol kunvivi kun tia edzo, ke tiom amata ŝi estas, ke li aŭdacis plenumi tian skandalon — eĉ tian aferon fine la rabisto kuraĝis eldiri!

Persvadite de la rabisto, mia edzino levis sian vizaĝon kun revantaj okuloj. Mi ankoraŭ neniam vidis tiel ĉarman mian edzion kiel en tiu momento! Sed aŭdu kion respondis la ĉarma edzino al la rabisto ĵus antaŭ la okuloj de mi ŝnur-ligita? Mi vagante en la intera-regiono submonda neniam povas rememori la tiaman respondon de mia edzino sen ekflami de furioza kolero! Mia edzino sendube diris al li responde: Min prenu kien ajn vi iros! (Longa silento.)

Ne tio sola estas la tuta peko de mia edzino. Ne; se pro tio sola, mi ne tiom suferus nun en la sfero de la mallumo! Sed kiam ŝi — al mi kiel en songo — estis ekironta el la arbardensejo kondukate de la rabisto per mano, ŝi subite kun la paliĝinta vizaĝo fingro-montris al mi sub la cedron kaj freneze kriis multajn fojojn — “Mortigu lin! Dum li vivas, mi ne povas vivi kun vi! Mortigu lin!” Mortigu lin! — ĉi tiuj vortoj ankoraŭ nun plue vibras tra miaj oreloj kaj, kiel uragana muĝo, forblovas min kap-malsupren en la foran abismon de la mallumo! Ĉu la vortoj tiel kondamnindaj kiel ĉi tiuj povis iam eliri el la homa buŝo? Ĉu la vortoj tiel malbenindaj kiel ĉi tiuj povis iam tuŝi la homan oreleon? Ĉu iam povis la tiel — (Ŝprucanta mokridego subita.) Ĉe tiuj vortoj eĉ la rabisto momente perdis la koloron de sia vizaĝo. “Mortigu lin!” — tiel kriante mia edzino tenis sin kroĉe sur la brako de la rabisto. Tiu ĉi fikse rigardis ŝin, ne jesante nek neante pri la mortigo. Kaj apenaŭ mi pensis tiel, mia edzino jam estis teren-ĵetita per lia unu pied-bato sur la bambuan sekfoliaron. (Denove ŝprucanta mokridego.) Trankvile la rabisto krucigis la brakojn sur la brusto kaj turnis la okulojn al mi. “Kion vi volas fari pri tiu virino? Ĉu vi volas ŝin mortigi aŭ lasi vivi? Respondu nur per kapskuo! Ĉu vi volas ŝin mortigi?” Ja eĉ sole ĉi tiuj vortoj sufiĉas por ke mi volu senkulpiĝi la rabiston je lia tuta peko. (Denove longa silento.)

Dum mi hezitis, mia edzino kriis ion nekomprenoblan kaj ekkuris en la foron de la arbardensejo. La rabisto subite sin ĵetis post ŝin, sed ĉi-foje ne kaptis ŝin eĉ je la maniko. Tian scenon mi rigardis nur kvazaŭ en vizio.

Post kiam mia edzino jam forkuris, la rabisto levis mian glavon kaj pafarkon kun saĝoj, kaj tranĉis al mi la ŝnuron ĉe unu punkto. “Baldaŭ venos mia vico!” — jen kion mi memoras murmuritan de la rabisto kiam li malaperis el mia vido — ekster la arbardensejon. Jam regis kvieto en la tuta ĉirkaŭaĵo. Ne, mi aŭdis ankoraŭ iun plori. Mi akiris miajn orelojn malligante la ŝnuron de sur mia korpo. Mi tuj rimarkis, ke la ploro estas de neniu alia ol mi mem! (Trifoje longa silento.)

Mi peze starigis mian laciĝintan korpon de sub la cedro. Antaŭ mi kuŝe brilas la glaveto kiun mia edzino lasis. Apenaŭ mi ĝin levis, mi per unu piko enpuŝis ĝin en mian bruston. Io — sangeca maso vome elgorĝas en la buŝon. Doloron mi tamen ne sentas. Kiam mi sentis mian bruston malvarmiĝinta, pli regis morta silento tra la ĉirkaŭaĵo. Oh, kia trankvilo! En la aeron super ĉi tiu apudmonta arbardensejo eĉ ne unu birdeto venas pepi. Inter la supraj branĉetoj de la cedroj kaj bambuoj ŝvebas nur la soleca sunlumo. La sunlumo — ankaŭ ĝi fariĝas pli kaj pli malhela. La cedroj kaj la bambuoj jam ne estas al mi videblaj.

Mi — falinte tie — estis kovrita en la profunda trankvilo.

Mi tiam rimarkis ke iu venis apud min ŝtelpaŝe. Mi volis tion vidi. Sed ĉirkaŭ mi regis jam la mallumo krepuska. Kiu? Kiu nekonata, tiu deprenis per nevidebla mano la glaveton de ĉe mia brusto. En tiu momento, denove la sango fluis en la buŝon. Post tio mi falis por eterne en la mallumon de la intera-regiono submonda. (Dec. 1922)

Eljapanigis: *Teruo Mikami*



← La ĉefpordo en la Kiotc-Imperia Palaco

Fotoj de Oda



→ La historia ŝton-monumento anoncanta ke ĉi tie iam staris la Raŝomon-pordego, Kiotc

Noto pri “En Arbardensejo” kaj ĝia filmigo

Inter niaj legantoj kredeble estas kelkaj, kiuj vidis la japanan filmon — aŭ kiuj almenaŭ memoras ĝian titolon — RAŜOMON, kiu gajnis la *grand prix* en la Internacia Film-Konkurso 1951 de *Venice*, Italujo. La ĉeftemo de la filmo estas adaptita el “*En Arbardensejo*”, de Riunosuke Akutagaŭa, kiun mi esperantigis ĉi tie. La film-titolo, RAŜOMON, estas adoptita el la sam-titola novelo de la sama verkisto. Kaj tamen, la enhavo de la nomita novelo ne estas utiligita krom kelka materialo, kiun oni adaptis por doni la scenajn fonojn al la filmo nur ĉe la komenco kaj ĉe la fino.

La vorto “Raŝomon” estis la nomo de unu el la Pordegoj, kiuj staris sur la ĉefstratoj de Kiotc kiam la urbo ankoraŭ estis la sidejo de la imperia kortego (794-1868).

La krimea okazaĵo, pritraktita en *En Arbardensejo*, estas el tiu same malnova tempo. En la originalo de *En Arbardensejo*, kvankam verkita en la pure moderna

lingvo, tie kaj ĉi tie aperas kelkaj arkaikaj nomoj (precipe de vestaĵoj) kaj frazoj, kiuj rememorigas al ni la pratempecon de la mikro kaj medio. Sed tiujn mi nur laŭsence esperantigis por glatigi la legadon — escepte la okazaĵojn, en kiuj mi faris la vortoklarigon.

La vorto "Urbo" (aŭ "Urbo-moda"), kiu aperas en mia traduko, signifas: Kioto kiel la ĉefurbo — sidloko de la imperia kortego, kaj per ĝi la legantoj komprenu ke la novelo temas pri krima okazaĵo de la malnova tempo — almenaŭ antaŭ 1,200 jaroj.

La Tradukinto

VORTOKLARIGO

- ① *Ĉoo*: Japana mezurunuo de voj-distanco (=109.0909 metroj.)
- ② *Sapana*: nigreruĝa. Origine, *sapano* estas arbeto (*Caesalpinia Sappan*) el kies trunko oni ekstraktis la farbon nigreruĝan. (La vorto trovebla en la Jap-Esp. Vortaro de Ĉif, kaj ankaŭ de Okamoto.)
- ③ La alteco de kvar *ki*-oj: Speciala dirmaniero pri la alteco de ĉevalo. *Ki* estas dekonono de *ŝaku* (1 *ŝaku* = 0.30303 m.) Oni ne menciis la bazan altecon de ĉevalo, fiksitan je 4 *ŝaku*. Tial "la ĉevalo de kvar *ki*" havas entute la altecon de 4.4 *ŝaku* (de la plando ĝis la skapolo).
- ④ La unua kvinono: ĉirkaŭ la 8-a horo p.t.m. laŭ la nuna horo-kalkulo. Antikve, oni dividis la nokton en kvin partojn.
- ⑤ *Pindolo*: Unu el la dek-ses sanktuloj en la tempo de Gotamo la Budao; ĉi tie, lia statuo. En Japanujo estis la popol-kredo, ke li kuracas malsanojn se oni frotas lian statuon per mano kaj aplikas la manon al malsanaj partoj de sia korpo.
- ⑥ *Samurajo*: Trovebla en la Suplemento de P.V.
- ⑦ *Melio*: *Melia japonica*, arbo, el kiu oni eltiras incenson. Sed antikve, oni plantis ĝin antaŭ malliberejo kaj sur ĝia branĉo oni pendigis la kapon de ekzekutito. Por ĉi tiu signifo, la japana vorto estas "ooĉi" kiel Akutagaŝa uzas. "Ooĉi" estas la malnova vorto por "sendan", kiun vorton ni uzas hodiaŭ. La vorto *melio* estas adoptita en la Jap-Esp. Vortaro de Okamoto, sub "sendan".

La Praktiko

La Gazeto de la Mondpopolo

Abonprezo por unu jaro: 24 Steloj (6 ned. guld)
 Japanaj gesamideanoj sendu ¥ 580 al la Redakcio de OOMOTO
 kaj ili ricevos LA PRAKTIKO-n rekte de la eldonejo.

Eldonejo:

UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Parolas la Legantaro

★ S-ro A. Nikolov, Sofio, Bulgarujo

Post tre longa interrompo, antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis la lastan n-ron de OOMOTO. Mi ĝin tute neregule ricevas. Antaŭ tre longa tempo mi ricevis ankaŭ vian longan leteron, al kiu mi ne respondis pro personaj kaŭzoj. Ni ĉiuj tre ĝojas, ke post longa interrompo OOMOTO ree komencis normalan agadon. Kaj mi elkore deziras, ke ĝi neniam ĉesu.

Kun doloro ni eksciis, ke s-ro Onisabro Deguĉi forlasis la fizikan mondon. Sed ni estu certaj, ke li ne lasos la movadon sen spirita gvidanteco. Li zorgos pri ĝi el la spirita mondo kaj li ĝin gvidos majstre.

Majstro Petro Danov same forlasis nin en la fizika mondo en 27. Dec. 1944. De post tiam la movado daŭras sian laboron, kun la anoj legantaj kaj pristudentaj la prelegojn kaj la lekciojn iam faritajn de li. Majstro Danov faris ĉ. 7-8 mil lekciojn speciale por la disĉiploj kaj prelegojn ĝeneralajn por ĉiuj. Krom tio antaŭ kelkaj jaroj estis eldonitaj, en unu granda riĉe ilustrita volumo, multaj el la tre gravaj konversacioj kaj intervjuoj kun li. En la prelegoj kaj la lekcioj estas donitaj centoj kaj certe miloj da naturaj leĝoj kaj reguloj. Se oni legus po du lekcioj ĉiutage estos necesaj dek jaroj por tralegi ĉion. Kaj kiom da horoj estus necesaj ilin pristudi kaj apliki en la vivon? Tio, tamen, ne devas nin senkuraĝigi, ĉar tralegante kiun ajn el liaj lekcioj aŭ prelegoj, oni nepre trovos ion specialan por si.

★ S-ro Charles Chomette, Los Angeles, Usono

Vi sendube estos interesata ekscii ke ĉiuj aperis publike tre grava filmo en Los Angeles, titolita "Altars of the East", (Altaroj de la Oriento) farita de tre konata filmaktoro nomata Lew Ayres.

Tiu filmo, pri kiu mi skribis en "Heroldo" de la 16a de okt., 1955, pri-parolas OOMOTO-n, klarigante ke ĝi aprobas kaj uzas Esp-on, kaj eĉ aperigas, en plilarĝigita formo, vian revuon kun teksto en Esp., Esp-an flazon, la verdan stelon kaj eĉ belan japaninon parolanta esp-an frazon; la tuto estas tre favora al via religio kaj al Esp.

Mi skribis al s-ro Jung pri tiu filmo en detalo; vi do povas legi pri ĝi en unu el la venontaj eldonoj, sed mi tre deziris informi vin persone pri ĝi, ĉar via movado meritas multe pro via longa fideleco al Esp.

Mi konis s-ron Niŝimura persone. Via revuo (la julia n-ro de OOMOTO INTERNACIA, 1934) publikigis la fotografiaĵon de mia edzino, mia unua filino Dianto kaj mi mem kiel Esp-ista familio kun aŭtobiografio, ni do estas malnovaj konatuloj. Ĉar mi helpis s-ron Lew Ayres pri la esp-a parto de lia filmo, mi iom fieras esti la unua por informi vin.

Mi ankoraŭ havas tiun ekzempleron de via revuo kaj nun tenas ĝin en mia mano; ĝi havas grandan valoron por mi.

Mi esperas ke via movado Oomoto fariĝos pli kaj pli konata dank' al la belega filmo de s-ro Ayres kaj ke tiu filmo estos montrata en via lando post ne tre longe.

★ S-ro *M. C. Butler*, Kingston on Thames, Anglujo.

Permesu, ke mi gratulu vin pri via protesto sur pp 92, 94 de la nuna OOMOTO (1955), kontraŭ la trofacilanima enkonduko de senutilaj neologismoj. Precipe min ĝenas la perforta enkonduko de sinonimoj por vortoj formitaj per afiksoj. Kiel

utilas prediki, ke Esperanto estas facila, kaj ke oni povas formi vortojn pere de afiksoj, se oni forigas *mal-, -ej*, kaj devigas nin anstataŭe uzi tute senutilajn anstataŭaĵojn?

En la antaŭparolo al "Memlernolibro de Esperanto" de Iŝiguro, 1935, mi skribis:

"Kvankam Esperanto estas lingvo Eŭropa laŭ vortaro, laŭ strukturo ĝi estas lingvo Orienta. Vi, orientanoj, povas multe influi, gardante nian lingvon kontraŭ la "enfluo de amaso da novaj vortoj, kiujn la okcidentanoj emas enkonduki tro facilanime kaj sennecese. Pli bone ol ni, niaj Japanaj samideanoj komprenas ekspluati la riĉajn eblaĵojn de la lingvo per kunmeto de jam ekzistantaj radikoj..." Tion mi ankoraŭ sentas.

★ S-ro *Canrad Fisher*, Meadville, Usono.

En artikolo de Oskar Berman pri E-poŝtmarkoj estas eraro: ĝis nun KVIN nacioj eldonis poŝtmarkojn pri nia lingvo! Aliaj nacioj eldonis kartojn kaj /aŭ kovertojn kun Esperanta teksto, sed la poŝtmarkoj mem surprisitaj sur tiuj



"tutoj" ne temas Esperanton. Mi ne povas kompreni kie s-ano Berman ricevis sian eraran informon!

★ S-ro *Josip Vajdlih*, Zagreb, Jugoslavio. OOMOTO estas interesa pro la materialo el via vivo: kultura-arta-lingva; precipe plaĉas al mi la rubrikoj: El la Notlibro kaj la Recenzoj, kiuj ne nur donas al la eldonistoj kaj al la verkistoj kuraĝigon, sed ankaŭ admonas al ili, kion oni pli bone ne devas fari, ekzemple: pri LA INTERNACIA LINGVO de prof. I. Lapenna, oni atentigas pri la kvazaŭ-malpermeso por bonvola traduko. Same, en unu alia n-ro oni rimarkigas al la Esp-organizo, ke kvankam ili ofte montras statistikon kiom da anoj havas iu organizo, tamen ili ne skribas kiom da libroj estas venditaj.

★ S-ro X (Eŭropano)

Okaze mi vidis la numeron de 9-10/54. Via recenzo pri la *S. de P.V.* min *tre* interesis. Via aludo al Waringhien sur p. 152 min ridetigis. Eble li pretendas posedi Japanan lingvon kiel Persan! Saluton.

★ S-ro *Alan E. Johnson*, Harrow, Anglujo

Mi havas plezuron enmeti ĉi-kune 16 Stelojn, kiel abonon por la 1955 OOMOTO-revuo. Mi gratulas vin pri la altvaloro kaj kvalito de la revuo. La diversstema enhavo pri religioj, mondfederalistaj aferoj ktp. estas tre interesa kaj bonvena, dum multaj esp-istaj gazetoj pritraktas nur — kaj eterne — lingvajn aferojn. Antaŭ dudek jaroj mi bonŝance loĝis kelkajn semajnojn — en hela printempo — en Japanujo, kaj memoras kun plezuro viziton al Kioto, Nikko, Nara, ktp.

★ S-ro *Nicolas Lopez Escartin*, Zaragoza, Hispanujo

Unualoke mi estas tre interesita koni pli bone vian movadon, ĉar kiel vi jam scias mi aliĝis al via revuo antaŭ nelonge, sed verdire tio ne sufiĉas por koni vian movadon tiel atente kaj profunde kiel mi deziras.

Pro tio mi dezirus akiri nun la verkojn titolitajn, "Kio estas Oomoto"

kaj "Fundamento de Animo," krome ĉiajn informojn pri verkaro de Oomoto kaj U.H.A. Ĉar mi konsideras vian gazeton riĉenhava, interesa kaj vere grava, mi dezirus kiel eble plej amplekse koni, ne nur la fundamenton de via movado sed ankaŭ ĉion rilate al ĝiaj celoj, filozofiaj doktrinoj ktp.

★ Prof. *Ernesto Farkas*, Szeged, Hungarujo

Dum jardeko, mi legas ĉiam kun plezuro viajn bone redaktitajn kaj presitajn unuopajn gazet-ekzemplerojn, kiuj atingas min. Ofte mi ekspoziciis ilin, kiam mi aranĝis esp. ekspoziciojn, kaj viaj gazetoj elegante reprezentis vian landon. Depost jardeko mi povas konstati vian tre laŭdindan fortostreĉon kaj klopodon por la intereso de la Homama movado. Mi rememoras bone, ke iam laboris en via redakcio mia samlandano s-ano *Jozefo Major*.

Mi nun preparas hungaran esp. bibliografion...

OOMOTO estas abonebla

ĉe la INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando (Poŝtkonto 40.88.26)

Abonkoto: 12 Steloj aŭ \$ 0.80 por 1 jaro

*

Francaj samideanoj povas aboni

ĉe Union Esperantiste Francaise

34, Rue de Chabrol, PARIS (10e), Francujo

(270 frankoj por 1 jaro)

*

Brazilaj samideanoj

ĉe nia Rezentanto: S-ro Elam Fonseca,

Caixa Postal 68, Tupaciguara, Minas, Brazilo

Anoncetoj

Estas maniero laŭ kiu vi povas finance helpi la internacion de militkontraŭuloj *sen* sendi monon!

Ĉu vi aranĝos kolekti uzitajn kaj neuzitajn poŝtmarkojn kaj sendos ilin al ni de tempo al tempo? Ni havas voluntulon kiu enklasigas kaj purigas la poŝtmarkojn, kaj disponas ilin por la dono de la kaso de W. R. I. Aerpoŝtaj kovertoj devus esti senditaj al ni tutaj — ili havigas bonan prezon.

Bonvole sendu al ni ĉiujn poŝtmarkojn, kiujn vi povas kolekti, kaj tiel doni tre praktikan helpon. Sendu ilin al:

La sekretario, Internacio de Militkontraŭuloj, 88, Park Avenue, Enfield, Middlesex, England.

Senpaga KORESPONDA SERVO Mondskala

Tutmondaj gesamideanoj,

Mi estas je via dispoŝo por havigi al vi kiel eble plej rapide taŭgan korespondanton aŭ eĉ plurajn, se vi deziras.

Vi nur skribu al mi laŭ la jena adreso: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, Laon (Aisne), Francujo, esprimante viajn dezirojn pri sekso, aĝo, lando, ktp., de la estonta korespondanto, kaj enmetu internacian respondupon maldekstre stampitan.

Pri *vi mem*, napre indiku sekson, aĝon kaj K (komencanto) aŭ P (progresinto) por ke mi povu kompletigi miajn listojn. Tiel, vi ne nur ricevos kiel eble plej

baldaŭ adreson de korespondanto konforma al via peto, sed *via* adreso estos siavice sendita al aliaj petantoj: tio multobligos viajn ŝancojn havi eksterlandajn korespondantojn!

La Servo estas sepaga, krom la respondkuponon por pagi la respondan afrankon kaj la gazetaran anoncadon.

Se mi havos en miaj listoj korespondanton tian, kian vi petas, vi senprokraste ricevos lian adreson; se ne, vi iom atendu, kaj mi sendos ĝin al vi tuj kiam mi ĝin ekhavos. ATENTU BONE! Nur pri ESPERANTA korespondado mi peradas!

Kun samideanaj salutoj.

Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo

*

★ *Esperanto-Sekcio de Ĵako-Klubo ĉe Vroclavia Universitato*, Wroclaw 8, GALLA 4/3, Polska, deziras korespondi kun junaj geamikoj el Japanujo kaj alilandoj pri diversaj temoj.

★ S-ro *Dimitr H. Enĉev*, str. Minĉo Yakimov 22, RUSE, Bulgario, deziras korespondi kun gesanoj el Azio.

★ S-ro *Kho Khwat Liat*, Gang Mandor 7 No 7, Djakarta, Indonezio, serĉas voluntulon, kiu estas preta por aĉeti al li la vortaron de 大漢和辞典, 13-voluma (havebla ĉe Daiŝuukan-Ŝoten, 3-ĉome, Niŝiki-maĉi, Kanda, Ĉijoda-ku, Tokio, por ¥ 5000 po ĉiu volumo). Kiel kompenson li povas sendi teon, kafon aŭ alian objekton.

★ Kiu konas la adreson de la germana s-anino, Grete Kraft, bonvole sciigu al s-ro *Tadashi Sakai* (malnova nomo, Ŝogecu Inoue), 45 Nishi-chamachi, Matsue, Shimane-ken, Japanujo.

OOMOTO n-ro 187—183 (1—2月号) 昭和31年3月1日発行・購読料一年240円
編集人中村陽宇・京都府亀岡市・株式会社天声社発行・振替京都25757番

